# AMERIKA ESPERANTISTO

DECEMBER, 1913

## WHY NOT
## DO YOUR CHRISTMAS SHOPPING EARLY

We are making a special Christmas offer of **three** subscriptions to the magazine and the A. E. Book in cloth binding for only

**FOUR DOLLARS**

mailing both from here, and sending the recipient a special holiday card stating that they are your gift. Follow up your propaganda work of the past few months by unique Esperanto Christmas gifts to your interested friends.

AVOID THE RUSH AND SEND IN YOUR LIST TODAY. Books will be mailed in time for the Christmas delivery.

**THE AMERICAN ESPERANTIST CO., INC. West Newton, Mass.**

# Special Combination Offers
## To New Subscribers Only

For a limited time we are able to offer the following combination prices:

| | | |
|---|---|---|
| One year subscription to Amerika Esperantisto, | $1.00 | $1.50 |
| and | | |
| American Esperanto Book (cloth), | $1.00 | |
| One year subscription to Amerika Esperantisto, | $1.00 | $2.00 |
| and | | |
| Complete Grammar of Esperanto (Kellerman), | $1.25 | |
| One year subscription to Amerika Esperantisto, | $1.00 | $2.50 |
| and | | |
| Esperanto-English Dictionary (Millidge), cloth, | $2.00 | |

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.
West Newton, Mass.

## LA MOVADO

L'Esperantiste Francais

Oficiala Organo

de la Societo Franca por la propagando de Esperanto

Publikigas informojn pri la organizado de la Xa Universala Kongreso de Esperanto en Parizo, 1914, la Pariza vivado kaj aliaj plej interesaj aferoj.

Ĉiuj gesamideanoj, precipe la estontaj gekongresanoj, devas do legi ĝin.

Jara abono Francujo; Fr. 2, 50

Alilando: Fr. 3, 25—Sm. 1,300

**41 Blvd St. Marcel, Paris, Francujo**

Sendo de la lasta numero kontraŭ unu internacia respondkupono.


## DEZIRAS KORESPONDI

[Unufoja anonco kostas 20c. (40 Sd.) por ĉiu linio. Kvarfoja anonco kostas 50c. (1 Sm.) por ĉiu linio. Linio enhavas proksimume 40 literojn, punktojn aŭ spacojn.]

S-ro Jacob Stukinsky, (19 jara) 1311 Moravia St., New Castlė, Pa., Usono. I. P. K. kun fremdlanduloj.

S-ro Sidney Lee, Box 292, Jennings, La., Usono.

Multaj instruistoj kaj gestudentoj volas korespondi kun ge-samideanoj en Usono kaj fremdaj landoj. Adresu: S-ro P. M. Schuyler, Estro de Lernejoj, Pickford, Mich., Usono.

S-ro Pimenov, Moriinskoje poĉt. otd. Tersk. obl., stanica Staropavlovskaja, Rusujo. I. P. K., kaj fotografaĵoj. Ĉiam respondos.

S-ro Mansfeld, Saale Wilhelm str. 4, Merseberg, Germany, interŝanĝos bildojn pri vapor-kaldronoj kiel diversaj valvoj, ktp. Resendos aliajn laŭ deziro.


# BOOKS! MAGAZINES!

We take this occasion to announce that all Magazine Subscriptions or Orders for Books of any nature published in U. S. may be sent to us, and will command the most prompt and careful attention

Magazine Subscriptions received at Publisher's Prices

Club Rates Quoted upon application

Help make this addition to our business a success. Send in your renewals or new subscriptions to your favorite periodicals TODAY

Our new magazine catalogue sent free on request

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.
West Newton, Mass.

## TO NON-EPERANTISTS:

Ask your enthusiastic Esperantist friends for a small English grammar of the language. Every *real* Esperantist carries a number of this handy little propagandilo.

25 Keys for only 25 cents. 100 for only One Dollar.

**The American Esperantist Co., Inc.**
**West Newton, Mass.**

LA ONDO DE ESPERANTO

MONATA ILUSTRATA REVUO
(fondita en la jaro 1909).

Ĉiu jarabonanto ricevos *senpage* la libron:

"ORIENTA ALMANAKO"

*el la lingvoj japana, ĥina, araba, hinda, sanskrita, persa, armena, kartvela k. t. p. k. t. p.*

"La Ondo" aperas akurate la 1-an datan, novstile. Ĉiu n-ro havas 16—24 paĝ. Formato 17x26. Bela kovrilo. (Poŝtk. ilustr.)

*Sendu abonpagon ($1.10) alla American Esperantist Co., West Newton, Mass.*

"Oni diras ke li pentris araneaĵojn sur la plafono tiel perfekte ke la servistino sin eluzis penante malsuprenbalai ilin."

"Eble estas tia pentristo, sed neniam estis tia servistino."

* * * * *

SINO. SIMPSON—Nun, Robĉjo, mi eliras, kaj mi volas ke vi zorgu pri la domo simile al vireto, kiel via patro farus se li estus tie ĉi.

ROBĈJO—Ĉu estos necese ke mi kisu la vartistinon?—*Life.*

BUY BOOKS WITH A

## COUPON TICKET

You get $5.50 in coupons for $5.00, or $11.00 for $10.00. The saving in money is good, but the saving of time is better. Quick and convenient—if you want three books, worth $1.65, you just cut off $1.65 in coupons, and mail them with your order. If, as sometimes happens, the 35-cent book is out of print—back comes a 35-cent string of coupons and the transaction is closed. No waiting at the post office window for a money order!

Convenient? That's where we get even—it's so convenient that it makes ordering books a positive pleasure.

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.
WEST NEWTON, MASS.

# Amerika Esperantisto

## American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

*Published Monthly by*

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)

West Newton, Mass.

ONE DOLLAR A YEAR Eksterlande $1.25 (Sm. 2.50) SINGLE COPY TEN CENTS

Mallongaj verkoj, tradukaĵoj kaj novaĵoj estas ĉiam prefere akceptitaj. *Oni ne resendas* neakceptitajn manuskriptojn, se la sendinto ne kune sendis la resendpagon. La Redakcio konservas por si la rajton korekti manuskriptojn laŭbezone. Oni donos la preferon al manuskriptoj skribitaj skribmaŝine.

VOL. 14 DECEMBER, 1913 No. 5

## EL LA REDAKCIA SANKTEJO


### KRISTNASKAN SALUTON

Dum finiĝas la jaro 1913 estas dezirinde ke ni, esperantistoj malantaŭen rigardu, kaj tiel rigardante, demandu al ni ĉu la progreso de nia afero dum la jaro estas por ni sufiĉa. Ĉar al nia oficejo venas preskaŭ ĉiuj novaĵoj pri nia progreso aŭ alie, *ni* volas diri al vi, niaj amikoj amerikaj, ke la ĵus finiĝanta jaro efektive estas pli bona por ni ol iu jaro ankoraŭ pasinta.

Nia asocio kreskas rapide, kaj vekiĝas multe da intereso pri Esperanto tra nia tuta lando. Al Amerika Esperantisto venis dum la jaro multe da pligrandiĝo de nia abonantaro, kaj ankaŭ pli granda disvendado de libroj k.t.p. ol en iu jaro antaŭa, kaj tiuj faktoj donas al ni multe da kuraĝo (ankaŭ la necesan monrimedon) ankoraŭ plu antaŭenpuŝi nian movadon dum la venonta jaro. Karuloj—Kuraĝon—ŝultron ĉe ŝultro ni laboru—"Semu kaj semu konstante." Ni deziras al vi ĉiuj ĝojan Kristnaskon kaj plej prosperan Novjaron.

En la novembra numero ni anoncis ke ni aĉetis por A. E. novan linotipon. Ni esperas ke ĝi lokiĝos en nian oficejon antaŭ la nova jaro, sufiĉe frue por komposti la januaran numeron, kaj de tiu tempo

ni promesas ke neniam plu via gazeto aperos tiel malfrue kiel dum la ĵus pasintaj du monatoj. Jen bildo de la venonta maŝino.



En unu ĵurnalo ni ĵus legis raporton pri la Naŭa Kongreso, kaj kiel aklame oni bonvenis unu flankvojemulon kiu, fine sciiĝinte pri sia eraro revenis al la gepatra domo. Vere, en esperantujo troviĝas pli da ĝojo pro la reveno de unu idistpekemulo ol pro la naŭdek-naŭ fidemaj laborantoj kiuj firme rifuzas aŭskulti la rompemulojn, sed konstante kaj konscience laboras por kreskigi anstataŭ detrui nian aferon. Laŭ nia opinio estus pli bone, anstataŭ buĉi la grasigitan bov-idon, mortigi la revenantan id-bovon kaj permesi ke la antaŭdirita bov-ido manĝu liajn pecojn—ni ne forgesis nian naturan historion sed opinias ke en tiaj cirkonstancoj eĉ bovido (se ĝi estus esperanta bovido) fariĝus viandmanĝanto.

## POSTKONGRESAJ IMPRESOJ DE SINJORO KIU NE ĈEESTIS

Atinginte la hejmon post mia taga laboro mi trovis la oktobran numeron de Amerika Esperantisto kaj mi ne povis kredi miajn proprajn okulojn kiam mi vidis la neordinaran dikecon de la gazeto. Ĝi aspektis kiel plenkreskulo kaj mi tute ne hontis metante ĝin flanke

de miaj anglaj gazetoj. Kiam mi malfermis la gazeton kaj vidis la ilustraĵojn kaj komencis trarigardi la skribaĵojn mi estis ankoraŭ pli surprizita kaj miaj okuloj elstaris kiel butonoj sur surtuto. Sendube la ĉefredaktoro, la subredaktoro, la stenografistino kaj ĉiuj subuloj en via sanktejo laboradis kiel formikoj super ĉi tiu numero ĉar ĝi estas sufiĉe bona por iu kritikemulo.

Pri la Kongreso mi legis kun vera plezuro kaj dum mi legis mirinda afero okazis. Subite mi trovis min inter la kongresanoj, kaj por la unua fojo en mia vivo mi estis unu el ili. Kia mirinda spektaklo! Mi facile rekonis la eminentajn esperantistojn, kies bildojn mi ofte estas vidinta en gazetoj. Ne malproksime mi vidis la Majstron kaj mi iris al li kaj humile premis lian manon. Mi trovis sinjoron Privat en serioza konverzacio kun kelkaj eminentuloj kaj mi salutis ilin ĉiuj kaj ne povis ne partopreni en la interparolo. Forlasinte la grupeton mi preskaŭ faligis Sinjorinon Hankel pro mia nepardonebla rapideco sed ŝi nur afable ridetis kaj mia purpura vizaĝo iom post iom retrankviliĝis, kaj dum kelka tempo ni interparolis pri mia nova libro, kiun publikigos American Esperantist Co. Apenaŭ mi finis paroli kun ŝi, mi vidis la imponan formon de Rektoro Boirac. Mi volis paroli kun li kaj premi ambaŭ liajn manojn sed li malaperis en la amaso. Nun venis unu famulo post alia en vere kinematografa maniero; D-ro Mybs, Generalo Sebert, S-ro Perogordo, Chavet, Hodler, Rollet de l' Isle, k. t. p., k. t. p.. k. t. p., kaj dum longa tempo mi ne plu povis rekoni la vizaĝojn. Ni ĉiuj nun eniris vastan ĉambron kaj mirinda programo komenciĝis. Lertaj oratoroj parolis tiel elokvente ke grandaj salaj larmoj subite elfluis el miaj okuloj kaj kuris laŭ la vangoj. Meze de la paroladoj la orgenisto ekludis kaj gaja kunkantado komenciĝis. Ĝi estis interrompita per la subita kaj terura sonorado de ĉiuj sonoriloj de la urbo. La esperantistoj paliĝis pro teruro, kaj en tiu sama minuto mi vekiĝis el mia dormeto kaj trovis min en mia propra ĉambro kaj la telefono laŭte sonoris.

LEHMAN WENDELL.

---

## LA OBSERVO DE LA KRISTNASKO

DE HENRY VAN DYKE

Estas bone observi la Kristnaskan tagon. Nure, por nomi tempojn kaj sezonojn, kiam homoj konsentos haltigi la laboron kaj, kune, feliĉiĝos, estas saĝa kaj bonsana kutimo. Oni, la pli facile, sentas la superecon de la vivo komuna super la vivo individua. Pro

tio, la homo ordigos sian tempon, iam, laŭ la granda, suntempa, horloĝo de humaneco.

Sed estas io pli bona ol la observo de tago—kaj, tio estas la observo de la Kristnasko. Ĉu vi volas forgesi tion kion vi por aliaj faris kaj rememori tion kion ili al vi faris; ne noti tion kion la mondo al vi ŝuldas kaj pensi tion kion vi al la mondo ŝuldas; meti malantaŭe viajn rajtojn, kaj viajn devojn proksime, kaj viajn okazojn por bonfari antaŭe; por vidi ke viaj homoj estas ja tiel realaj kiel vi mem, kaj peni rigardi post iliaj vizaĝoj al iliaj koroj, malŝatantaj je gojo; por konfesi la bonan kialon por vivi estas tio kion vi ricevos el la vivado, ne tio kion vi eble donos al la vivado; por fermi la libron de plendoj kontraŭ la administrado de la tutmondo kaj ĉirkaŭrigardi por trovi lokon kie vi eble semos kelkajn semojn de feliĉeco—ĉu vi volas fari tiujn ĉi aferojn eĉ dum unu tagon!

Ĉu vi volas por kliniĝi kaj pripensi la bezonojn de la geinfanoj; por rememori la malfortecon kaj la solecon de tiuj, maljuniĝantaj; por demandi ne kiom viaj amikoj amas vin sed ĉu vi sufiĉe amas ilin; por teni, pense, tion, kion aliaj devus porti en la koro; peni kompreni tion, kion tiuj, kiuj loĝas samdome kun vi, efektive deziras kaj ne atendas ĝis ili tiel diros; pretigi vian lampon por ke ĝi eldonu la plian lumon kaj la malplian fumon kaj porti ĝin antaŭ vi por ke via ombro post vi aperu; fosi tombon por viaj malbelaj pensoj kaj ĝardenon por viaj bonvolaj sentoj—lasante la pordegon malfermita—ĉu vi volas eĉ dum unu tagon tiujn ĉi fari? Tiam, vi povas observi la Kristnaskon.

Ĉu vi volas kredi ke la amo estas la plej forta en la mondo—pli forta ol la malamo, pli forta ol la malbono, pli forta ol la morto—kaj ke la benita vivo kiu komencis en Betlehemo antaŭ 1900 jaroj estas la imagaĵo kaj brileco de la Eterna Amo? Tiam, vi povas observi la Kristnaskon.

Kaj, se vi povus observi ĝin tagon, kial ne ĉiam? Sed vi ne povos sola observi ĝin!

*Tradukis el "La Spirito de la Kristnasko,"*

BOEMO.

---

## ESPERANTO IN USE AND THE U. E. A.

Opinions may differ as to the best schemes for spreading Esperanto but all will admit that the method which can present the most striking examples of the International Language in *actual use* will most rapidly advance the movement. I am convinced that the chief

obstacle to the progress of our cause is the idea,—which, tho dimly formulated by the average person who prides himself on his practicality is nevertheless quite potent—that Esperanto and esperantismo are things only to be dreamed about; things which can only be realized in a far-off, never-to-be-reached golden age. Therefore the dreamers are to be given scant encouragement,—as for the utopians, —always pictured as wild-eyed and long-haired fanatics—the self-satisfied and practical people have little use for them.

One need be only a beginner in Esperanto to see that there are immense possibilities for it, but the *eklernanto* does not always see (for we do not emphasize this point sufficiently) that the language is a matter of the *present*, an actual, living medium of communication and world solidarity. Is not this weakest spot in our propaganda well shown by the numbers of students who drop out of our classes after a few lessons? Enthused by the glowing pictures presented by the propagandist they begin the study only to find themselves after a time pursuing Esperanto instead of esperantismo. To a large extent this is unavoidable; often a student cannot be urged to make use of the language until he feels confident in his ability to use it properly. But ere this ability arrives comes, alas, a weariness of grammar and the class has lost a student and the club a member.

How often have we been asked, "Do you really think Esperanto will ever become universal?" As tho its worthwhileness should depend upon its universality!. To such a question I usually reply that my interest in the language is chiefly in its present use. I do not need the cooperation of the entire world; I wait for no millenium. Already there are enough who do use the language,—people of intelligence who are interested in the same vital questions, who follow the same profession or hobby as myself,—to make my learning it worth while. And, mark you, they are users of the neutral tongue not merely in the *por*-Esperanto but in the *per*-Esperanto sense.

This brings us to a matter which thus far has received scant attention from Esperantists in this country and which merits more than the occasional paragraph appearing on the pages of "Amerika Esperantisto." In this country we hardly appreciate the work that the "Universala Esperanto-Asocio" (U. E. A.) is doing to further international relations. Founded about five years ago to put the language to actual use its work has been entirely of a practical nature and only indirectly to propagate the language. In whatever way or for whatever purpose a person may have relations with another in a foreign country, whether for travel, commerce, employment, social or religious propaganda, study or the mere pursuit of a pastime, the services of the U. E. A. are of profound importance.

By means of its nine hundred *delegitoj* in all parts of the world anyone seeking help or information can be brought into touch, not only directly with anyone of its thousands of members, but also indirectly with a practically unlimited number of non-Esperantists of nearly every nationality.

Allow me to cite my own experience. Last summer during a vacation journey thru nine different countries of Europe I had the opportunity of putting to the proof the claims which the Association makes. Tho I was expecting big things I am glad to say that the result was far beyond my expectations. I was everywhere cordially received by the U. E. A. delegate, given the introduction to the people I wished to meet and the guidance to things I wished to see. In many little ways too numerous to mention here the delegate literally put himself at my command and no trouble was too great for him to give in my behalf. I have talked with many returned travellers who had likewise invoked the services of the U. E. A. and I find that their experiences are but duplicates of mine.

But one does not have to go abroad to use profitably the help of the Association. The number of services thru correspondence are much more numerous and important. One may stay at home and thru the help of the U. E. A. delegates extend his knowledge of the world, broaden his culture and even increase his business. The matters which a delegate handles are quite varied. Once, it may be a request for information regarding the introduction of a new commodity, the gathering of facts in regard to some sociological movement or the conditions for admission to a certain university, the opportunities for employment to immigrants or it may be a request for assistance in buying some desired article. Quite lately in three separate instances I was asked as Delegate to hunt up the address of some long-lost comrade of an old-world inquirer.

Those of us who have as members made use of the services of this Association, as yet too little understood by American Esperantists, will testify to the great benefits which they have received thru its agency. We therefore do not hesitate to recommend to every reader of "Amerika Esperantisto" that he become a member of this world-organization. The direct personal benefits which such membership can and does confer have already been referred to. And don't forget, if you are a propagandist, that the visible demonstration of Esperanto in everyday use for everyday needs is the best possible argument to gain the support of the skeptical.

Membership costs only fifty cents per year, to be paid thru the Delegate. If your town as yet has no Delegate, why not nominate yourself for the job? Send your name to Mr. D. E. Parrish (4525

Moneta Ave., Los Angeles, California) the American Agent of the U. E. A., whose headquarters is in Geneva, Switzerland. You need have no fear of being overburdened with the duties of your office. Esperanto in America has not yet reached that happy state when even in a big city—and I can speak from two years' experience—the delegate has too much to do. Especially all-too-seldom will be the visiting Esperantist from abroad. After meeting one or two you will get some idea both of the sufficiency of Esperanto and of the breadth of esperantismo with perhaps a surprise to yourself at your own proficiency in handling the international language.

Anyhow, whether you intend to use the U. E. A. much or little or whether your town can have but few relations with abroad, the next *Jarlibro* should show that every good-sized locality (and every small one too) in America has been placed on the U. E. A. map. In fact, you owe it to yourself to show that your town, be it only a small one, is at least *ready* to serve in this movement which means so much in the progress of civilization.

HENRY W. HETZEL,
*Delegate for Philadelphia.*

---

## LA IDEALISMO

En suda ĝardeno sin kaŝas
Fontano, ŝirmata de palmoj,
En ĝia kristala profundo
Aspektas la bildo ĉiela.
Ĉi tie la glora fruntego
De l' suno tagmeze rebrilas.
En ĝia spegulo la luno
Sin ofte silente rigardas,
Meznokte de bela printempo.

Modesta, tremanta floreto
Sin trovas ĉe l' rando fontana.
Malsupren ĝi klinas la pian
Kroneton, kaj pensas senĉese
Pri tiu mirinda profundo
Kaj ombra, lazura aspekto.

Jen de la ĉielo alvenas
Al ĝi okcidenta venteto.
Flugile ĝi dolĉe karesas
La purpurkoloran vangeton,
Kaj tiel mallaŭte murmuras:
Ho! kial, floreto, mallevas
Vi teren por ĉiam la kapon?

Rigardu nur supren! Adoru
La veran eternan Pralumon!

Sed sian enuan kaj lacan
Kroneton ne volas ankoraŭ
Altigi la floro. Ĝi revas
Konstante pri sia malhela,
Kvieta kaj blua mistero,
Kaj povas neniam kompreni
La grandan enigmon estadan.

Alvenas siblanta ventego,
Trairas rompante la arbojn
Ĝardenajn; minace sin portas
Ĝi super la bela fontano.
Ho ve! La kristala spegulo
Nun iĝas subite malklara;
Kaj antaŭ la flora okulo
Pereas la luma rebrilo.
Sentema kreskaĵo, ĝi tiam
Kun lasta ektremo malĝoje
Mallevas la kapon—kaj mortas.

*El la Sveda lingvo tradukis,*
J. LEKBERG.

---

"Kio devigas viron ĉiam doni diamantan fianĉan ringon al virino?"
"Virino." *Puck.*

## LA UNUA FLUGO

ĈU vi iam enviis al la papilio ties sensaciojn ĉe la elvolviĝo el la verma stato? Ĉu vi, kiam infano ĉe dimanĉa lernejo, ne sentis iam deziron tuj morti kaj fariĝi anĝelo nur pro ties povo flugi? Se vi estas tia persono, vi estas el la materialo el kiu aviadistoj kreiĝas, kaj vi facile komprenas ke ne estas ia rememoro pli agrabla ol la okazo de la unua flugo.

Studento ĉe aviada lernejo malofte supreniras, kun permeso, pli ol kvindek metrojn ĝis post kiam li estas rajdinta kiel pasaĝero kun sia instruisto. Tia flugo estas vere la unua. Mia instruisto estis Burnside, rilate kiun Amerika Esperantisto jam ion diris en oktobro. Tiu ne estas ordinara homo. Neniam mi povos kompreni lin. Kvieta, senpretenda utilitarulo, kiu enmetas tutan sian koron je la estanta afero. Li havis intereson pri la aviado nur unu tagon antaŭ kiam li komencis flugi. Al li koncerne nian lingvon mi unufoje parolis, dum ni kuŝis kune en la ombro de biplano atendantaj nafton. Li estis profunde interesita. "Tio estas bona afero; ĝi sukcesos," li diris. Senescepte la aviadistoj vidas nenion strangan aŭ neeblan en nia lingvo.

Ne vivas ekster Francujo viro kiu pli alten veturigis aeroplanon ol Burnside. Li havas plenan fidon al la aksiomo ke ju pli alte des pli sendanĝere estas. Tial kiam li sciigis min dum veturado al la aviada kampo, iun lunlumigitan matenon, ke sendube mi flugos kun li antaŭ ol la suno estos alta, mi ne estis tute indiferenta. La penso estis plena de ĉarmo, tre agrable la koro batis, la sentoj de la novekreita papilio estis miaj—mi flugos. Kaj kun tiu kiu pasis la amerikan rekordon de alteco! Malestime mi rigardis la malalte flugantajn birdojn. La plimulto da flugoj de komencantoj okazas ĉe sunleviĝo kaj sunsubiro, pro tio ke la aero estas plej trankvila tiam. Tiun matenon estis malvarme. Tuj post kiam la aŭtomobilo atingis la arbaron, ĉe kies rando la tri biplanoj de la aviada lernejo Thomas estis ligitaj, ni ĉiuj—en nombro ok, du instruistoj kaj ses lernantoj—malaperis inter la arboj por trovi fajrlignon. Nebulo pendis super la kampo, flugi tra ĝi estis nekonsilinde, ĉirkaŭ granda kampfajro ni kuŝiĝis kaj atendis. Ĉiujn popularajn kantojn oni kantis, pri ĉio esceptante la aviadon oni parolis ĝis fine super la montetoj la suno aperis kaj forpelis la nebulon. Burnside tuj sian maŝinon preparis por suprenirado; ĉiuj helpis en la ordigo. "Ĉu vi rimarkis ke la tolo de viaj flugiloj putriĝas?" iu demandis lin.

"La malbenita lako tion faris," respondis Burnside indiferente.

Mi ekzamenis la tolon atente, en ĝi notis plurajn truojn kaj fendojn kaj ne estis tiom treege brulanta per entuziasmo. Burnside unue supreniris sola por plezura ekskurso; ni aliaj restis ĉe la fajro rigardantaj lian silueton.

"Rigardu la mankon da klineco kiam li turniĝas," diris la alia instruisto, Mennerly. "Iam la ŝafkapulo falos kiel ŝtono tiel turnante." Tre interesa por la estonta pasaĝero. En la direkto al Savona, tri kilometrojn malproksime, aŭdiĝis aviada motoro. Ĉiuj kuris for de la arbaro por vidi ĉu iu el la aeroplanoj de la kompanio Kirkam alflugas. La bruo ne povis esti farita de maŝino de la lernejo Curtiss dek kilometrojn norde, ĉar tie oni dum monatoj flugis nur super lago. Sed ni nenion vidis, kaj baldaŭ la reveno de Burnside dronis ĉiujn aliajn sonojn. Li alteriĝis en angulo de la kampo, ni kuris tien.

"Alportu tabulon," li alvokis. Tio signifis ke mi supreniros. Kiam kun tabulo por sidejo kaj ferfadeno por ligi ĝin al flugilo mi atingis lin, Burnside, lia vizaĝo ruĝa pro la vento, ridetis bonhumore. "Rapidu, mi scias kie estas aeroturo, kaj mi volas vin faligi en ĝin." La sida tabulo ligita, mi rampis sur la flugilon. "Sidiĝu kiel eble proksime de la motoro, por malgrandigi la kontraŭstaron de la vento," Burnside ordonis. Mi lokis min sur la tabulo, kaj kun manoj premantaj la lignajn subtenaĵojn de la motoro diris ke mi estas preta. "Ne metu viajn piedojn kontraŭ la kontrolajn ferfadenojn," li aldonis, sekundon antaŭ ol ekpafadis la motoro. Ha, li povis senti sin trankvila koncerne tion.

Estis tre malagrabla la veturado trans la herbejo, la vibrado de la motoro skuadis min tiom ke mi ne povis ion atenti. Sed tuj venis kompara trankvilo—ni estis en la aero. Iel la motora bruado ne estas tiom laŭta post kiam aeroplano lasas teron. Mi rigardis mian piloton; estus bone noti ĉiun lian movon, kiel instruan ekzemplon en la flugarto, sed ŝajnis kvazaŭ li nenion faras. Tute alimaniere estas ĉe fluganto proksime de la tero. Rekte malsupren inter la kruroj do mi rigardis. La imago tute ne povas egali la realecon. La sunleviĝo estis tuŝanta ĉion per sia magio; ora estis la tero malsupra, purpura la malproksimo. Kiom diverskoloraj kaj ordaj aspektis la kulturitaj kampoj! Laboristo sur unu el ili haltigis siajn ĉevalojn kiam ni estis ĝuste super li. Mi supozis ke li volas observi nin, sed ne; li ne turnas la okulojn supren. Senatente li permesis nin preterpasi. Tre kutima afero estas la aviado en la ĉirkaŭaĵo de Bath. Ni iris horizontale, tiam supren, tiam horizontale k. t. p. en la direkto al la urbeto. Alproksimiĝis pale-verda lageto, ĝi memorigis min pri lago Salubria kaj mi ĉirkaŭen rigardis por trovi ĝin, sed ne vidis. Ho, ho,

tiu lageto de tiom malgranda amplekso estis Salubria. Kiu pensus tion.

Je la rando de Bath la maŝino faris duoncirklon; kelkaj personoj staris en la stratoj observantaj nin. Nun ni iris returne. Burnside rigardas al mi oblikve trans sia ŝultro ridetante. Subite lia vizaĝesprimo ŝanĝiĝis kaj li okupiĝis energie je la direktiloj. Mi interesiĝis. Ĉio krom la maŝino kaj ĝia piloto estis forestita. Kio estas okazinta? Ree li rigardis min, sed nun sub lia esprimo serioza mi ion tre bonvenan rimarkas; estas radietoj da amuzo en liaj okuloj. Granda ŝerculo estas Burnside. Mi estu trankvila kaj rigardu la belecojn sube. Aŭtomobilo haltis sur vojo kiun ni transflugis. Mi tre volis svingi al ĝiaj pasaĝeroj la naztukon, sed ni estis tro altaj por ke iu rimarku tian agon. Proksime de Savona ni pasas super la ruinigitan ventmuelilon kontraŭ kiu japana fluganto disrompis maŝinon kaj perdis sammomente la vivon en la primitiva epoko de la aviado, antaŭ unu au du jaroj.

Post duono da horo ĉirkaŭe la aviada kampo denove fariĝis videbla. Inter ĝi kaj la rivero Conhocton estas sufiĉe granda marĉo. Super ĝi mia piloto komencis sin ĵeti kvazaŭ freneza dekstren kaj maldekstren kontraŭ la flankajn kontrolilojn aŭ "ailerons." La maŝino balancis kiel boato, kliniĝante al ĉiuj tridek-du punktoj de la kompaso. Tamen mi sidis tute serene; la piloto estas la kaŭzo de ĉio mi sciis, kaj kiam li sin turnis al mi li trovis min ridanta. Poste, ĉe la tagmanĝo, mi lernis de Burnside ke li neniam sin trovis en situacio pli ekstrema ol je la transflugo de tiu marĉo. La aŭtomataj elpensaĵoj por flugmaŝina ekvilibro estas troveblaj ankoraŭ nur en gazetoj kaj en la Patenta Oficejo ĉe Washington.

Super la kampo ni faris ĉirkaŭon kaj tiam, tute tro baldaŭ, komencis la alteriĝo. Antaŭ ol mi tion atendis la vosto de la maŝino leviĝis—mi ne vidis ĝin, sed mi havis la impreson ke ĝi staras preskaŭ super la motoro—kaj anstataŭ esti antaŭ mi, Burnside estis sub mi. Tuj la biplano estis falanta po kvindek metroj ĉiusekunde. Malgraŭ ke mi jam vidis multe da similaj alteriĝoj timo frapis la koron. Mi timis, kaj ne tute senkaŭze, ke mi malsupren glitos de la flugilo; mi timis ke Burnside tro altigis la voston.

Jam la tempo venas kiam, laŭ mia opinio, estas urĝe horizontaligi la maŝinon. Li ne moviĝas. Ni estas nur du sekundoj de la ŝtonplena, pereiga tero. Li nenion faras. Kio estas al li? Unu sekundon pli. La decida ero da tempo pasas. Mi perdas konfidon al Burnside. Li estas farinta fatalan prokraston. La okuloj miaj fermiĝas, ridinde ŝajnas la tuta afero.

Sed en la lasta kvarono da tiu lasta sekundo ĝustatempe malan-

taŭen tiriĝis la direkta radeto, kaj la vosto falis. Ni naĝis kun sufokigata motoro kviete super la tero kvin metrojn suben ĝis kiam, sen ia skuo, la maŝino tuŝis teron. Laŭ observanta aviadisto ni ne estis dum la flugo pli ol 400 metrojn for de la terglobo. Sed ŝajnis tute 10,400, kredu la pasaĝeron.

M. JAMES.

---

## FABELO

Muelisto kaj lia filo estis kondukantaj sian azenon al apuda foiro, kie ili vendos ĝin. Ili ne longe veturis kiam ili renkontis aron da geknaboj, ridante kaj babilante venantaj el la urbeto. "Rigardu tien!" unu el ili ekkriis, "cu vi iam vidis tiajn malsaĝulojn, malfacile piedirantajn laŭ la vojo, kiam ili povus rajdi!" Aŭdante tion, la maljunulo ordonis sian filon ke li sursaltu la azenon, kaj poste, gaje paŝis je lia flanko. Baldaŭ ili ĝisiris grupon da maljunulcj, kiuj fervore diskutadas. "Jen!" diris unu el ili, "tio pruvas tion, kion mi ĵus diris. Kian respekton oni nuntempe donas al maljuneco? Ĉu vi vidas tiun friponulon, kiu rajdas kaj permesas ke lia patro piediru? Surteriĝu, bubaĉo, kaj permesu ke la maljunulo refreŝigu siajn lacajn membrojn." Tuj la patro igis la filon malsupreniri, kaj mem ekrajdis. Tiamaniere ili nelonge antaŭeniris kiam ili rekontis amason da virinoj kaj infanoj. "Nu, vi mallaborema maljunulo," samtempe sonis kelkaj voĉoj, "kial vi rajdus sur la besto, dum la kompatinda knabeto piediras, malfacile egalmarŝante kun vi?" La komplezа muelisto akceptis la sugestion, kaj tuj prenis la filon, sur la azenon, poste de si. Ili preskaŭ atingis la urbeton. "Diru honesta amiko," parolis urbano, "ĉu tio estas via propra azeno?" Jese respondis la maljunulo. "Ho! oni ne tion kredus, juĝante de la maniero per kio vi superŝarĝis ĝin. Vi du friponuloj pli bone portus la kompatindan beston, ol li vin!" "Ion por plaĉi al vi," respondis la maljunulo; "ni povas nur provi." Tial, surteriĝinte kun lia filo, ili ligis la krurojn de la azeno, kaj per helpo de stango, provis porti ĝin sur siaj ŝultroj, trans ponto, kondukanta al la urbeto. La afero estis tiel ridinda ke la popolo enmase elkuris por rigardi; ĝis kiam la azeno, kiu nemulte ŝatis la situacion, dise piedfrapis la ligaĵojn, kiuj ĝin tenis, kaj falante de la stango, dronis en la rivero. Honte kaj ĉagrenite la maljuna muelisto reiris rejmen, konvinkita ke, atencante plaĉi ĉiun li plaĉis neniun, kaj ankaŭ perdis sian azenon.

---

*Noto*—Antaŭ pli ol dumil jaroj, vivis Esopo, kiu de tiu tempo estas unu el la plej bone konataj verkistoj de fabeloj. Per ili li grafike kristaligis kelkajn moralajn veraĵojn. La deveno de multe el liaj materialoj

por tiuj fabeloj estas vualataj en la nebula mistero de la estinteco. Laŭ antaŭ-nelonge elfosita manuskripto oni konstatas ke la supre tradukita fabelo, unue sin trovas en la redakcia fako de malgranda gazeto, kiun li provis eldoni laŭ la ŝatoj kaj sugestioj de siaj abonantoj. Liaj spertoj kaj liaj konkludoj, sin ripetadas dum la de li miloj da jaroj.

Ko Fo.

---

## OFFICIAL COMMUNICATIONS

### THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA
**Central Office: Newton Center, Mass.**

The Editor of Amerika Esperantisto informs me that there are a good many of his subscribers who are not members of our association. There must also be several readers to each subscribed copy and it is to all these that I wish to make a personal appeal in behalf of the association. He considers your addresses as held in trust and will not give them to me. Even if he would, I could not write to you all personally and must ask you to consider this as a personal letter addressed to you individually.

Esperanto has become a world proposition and in order that all the Esperantists may work together our international congress, which in the past has been merely a social gathering, has been made an official body, in which every national body is represented, in direct proportion to its membership, and which will in the future legislate for *all* the Esperantists in every international question. With our ninety millions of intelligent people it is humiliating to report a number of Esperantists inferior to that of many little nations which would become entirely lost in one of our great States. National pride should inspire every Esperantist in Usono to become identified with our national body and to help bring it about that we shall be represented in proportion to our importance as a nation.

I have touched upon several phases of the importance of organized work in previous issues of this magazine and already hearty response is being made to the appeals of the officers of E. A. N. A. We are invading new territory and many new local groups are being organized. There are still, however, thousands of Esperantists who for one reason or another, prefer to remain aloof from our organized attempt to propagate Esperanto. The reason is hard to guess. Why are *you* not with us? Do you believe in the future of Esperanto and do you want to see it considered by those outside our immediate ranks as something more than a fad,

fostered by a few fanatics? If you do, your place is as a member of our association.

Do you feel that in contributing fifty cents per year toward the support of Esperanto in your country you are receiving nothing in return, but are helping support the officers in idle luxury? This really isn't so. Every week we are answering dozens of letters from our Central Office and are sending information and literature broadcast. Your fifty cents *helps* us do this, but where you are contributing cents, others are sending us dollars. The small fee was never intended to make us self-supporting; it was established so that even the most humble Esperantist could become a member of E. A. N. A. on an equal footing with the man who could pay five or fifty dollars for the same privelege without embarassing himself financially. The whole Esperanto movement is a movement of the people, and it is the people that we want. We are glad to get financial support but the moral support we *must have.*

Scores of men and women are devoting themselves unselfishly to the work in the capacity of various officers and committees of the association and you individually owe it to them to give them the encouragement which would come from your own membership in that association.

Next July when we send our official representative to Paris for the tenth international congress shall we send him as representing two thousand American Esperantists, or ten thousand?

ARE YOU WITH US?

Very truly yours,

DR. C. H. FESSENDEN,

Secretary, E. A. of N. A.

---

## IMPORTANT

At the recent Congress in Bern there was founded the "Tutmonda Unuiĝo de la Esperantistaj Societoj" which is to be the official international organization of propaganda societies. The following have already become members of the "Unuiĝo": The British Esperanto Association, German Esperanto Association, Netherland Association, The Polish Federation, "Kataluna" Federation, Spanish Society for the Propaganda of Esperanto, The Hungarian Society and The Swedish Federation. It is probable that before the next issue of this magazine many other national societies, including EANA, will have become members of the Unuiĝo. The object of this organization is to facilitate relations between the naio nal societies through the "Centra Oficejo." It is of the utmost importance that as accurate a list as possible of ALL national Esperanto so-

cieties, together with their local groups, be registered at the CO. Inasmuch as the present "Jarlibro" contains many inaccuracies so far as the various societies in Usono are concerned (largely due to our own negligence in the matter), our Central Office has promised to help make this list reliable.

Will the secretary, or some officer of every Esperanto group in Usono send at once to the secretary of E.A.N.A. the following information: (1) Name and location of society; (2) Address of its President; (3) Address of its Secretary; (4) Delegito of U.E.A.; (5) Official representatives of any other Esperanto organizations; (6) Any business firm using, or favorable to Esperanto.

THIS APPLIES TO ALL ESPERANTO ORGANIZATIONS, WHETHER AT PRESENT OFFICIALLY CONNECTED WITH E.A.N.A. OR NOT, as every society furnishing the above information will be listed.

Please let your response be prompt. Address, Secretary, Esperanto Office, Newton Center, Mass.

---

NECROLOGY

Samuel W. Thomas, Brooklyn, N. Y.

---

*END OF OFFICIAL PART.*

---

## LETERO EL EŬROPO

De Nia Privat-a Korespondanto

### La Esenco de Niaj Kongresoj

"Niaj Kongresoj estas ne sole Kongresoj de la lingvo Esperanto sed ankaŭ de la interna ideo de esperantismo . . . Ĉio, kio povas krei pacan ponton inter la popoloj, tio ne sole ne devas esti timeme evitata en niaj Kongresoj, sed kontraŭe ĝi devas esti ĝuste la esenco de niaj Kongresoj . . ."
(L. Zamenhof. Malferma parolado. III-a Kongreso. Cambridge, 1907).

---

Ĉar la Bernan Kongreson ĝojige lumigis hela radio de tiu spirito de frateco, kiu donas la ĉefan valoron al nia movado, jam plendas kelkaj, admonante ke oni zorge evitu ion similan ĉe la Deka Kongreso. Kvankam ili afable konfesas, ke en Svisujo tia spirito estas taŭga kaj bonveninda, oni povas tamen rimarki ke pri grava manifestacio kaj

pri la sola parolado de D-ro Zamenhof dum la Kongreso, ili en siaj gazetoj tute silentas aŭ moke parodias eĉ sen antaŭa rakonto de l' faktoj.

Ĉiu estas libera aldoni spritan ŝercon aŭ eĉ severan malaprobon al raporto pri kongresa okazintaĵo, kiun li ne ŝatis. Sed estas sendube strange fari solenan admonon pri aferoj, kiujn oni eĉ ne fakte raportis.

Similan sistemon ja uzas ĉiutage la grandaj ŝovinistaj ĵurnaloj sed ne nia esperanta gazetaro. Feliĉe ĝi en plimulto tute ne imitis tiun ekzemplon kaj kontraŭe tute neŭtrale—kaj eĉ pli ofte favore—ĝi raportas pri la kuraĝiga spirito de frateco diversokaze montrita en Berno.

Tute amike mi devas aldoni ke la modo de "spritaj" raportoj pri la kongresoj fariĝas nun iom laciga ĉar tro ĝenerala kaj tro kutima. Antaŭ kelkaj jaroj la unuaj tiaj raportoj estis vere plezuriga novaĵo. Sed nun oni serĉas la aliajn por ripozi. Sendube tian spriteman manion oni devas ĉefe kulpigi kaj neniel la intencojn de ezperanta gazeto, kiam ĝi iom maldelikate ridindigus propacan manifestacion aranĝitan laŭ peto de Sir Vezey Strong kaj speciale anoncitan antaŭe. Tia sentaktaĵo estas tiom pli bedaŭrinda ke la sama gazeto certe indignus—tre prave—se alia revuo agus same malbonguste pri problindula aŭ alia nobla manifestacio. Cetere la nelerta ŝerco estus jam pli facile akceptebla se ĝi ne sekvus tiel proksime signifoplenan ĉefartikolon.

Kio do tiel malplaĉis al niaj admonemaj amikoj? Ĉu, ke en Berno oni ne plu disputis akre pri organizaj demandoj? Ke oni kore interfratiĝis kiel en Bulonjo, kiel en Krakovo? Ke la organizantoj salutis la kongresanojn per laŭdo pri la pachelpa flanko de nia afero? Ke 450 kongresanoj (inter kiuj 90 Francoj kaj 80 Germanoj) subskribis aliĝilojn al Mondamikiĝa Societo de Sir Vezey Strong? Ke Franco kaj Germano publike interŝanĝis manpremon kaj afablajn bondezirojn? Ke U.E.A. decidis ion fari por malhelpi publikigon de falsaj novaĵoj kaj gazetaj incitaĵoj kontraŭ aliaj nacioj? Al ordinara esperantisto ŝajnas, ke ĉio tio ĉi apartenas al la esenco mem de niaj kongresoj kaj ke prudenteco jam estis sufiĉe respektata, ĉar oni faris ĉion ĉi ekster la oficialaj kunsidoj.

Kial do la ĵus aludita sintenado de kelkaj, kiujn ni ĉiuj konas kaj amas kiel sincerajn bonintencajn samideanojn? Ĉar ili *timas*. Kion? Ke niaj kongresoj kompromitiĝus, ke ni turnos kontraŭ ni la registarojn k.t.p. Tia timo devenas de troa rigardemo al registaroj. Mi jam vizitis —nur pro Esperanto—sufiĉe multajn ŝtatistojn, kaj al mi donas la registaroj nek tiom da timo nek tiom da espero. Kiam nia forteco kaj graveco devigos ilin, tiam ili venos al ni vole nevole. Ĝis tiam ilia simpatio aŭ nesimpatio havas nur reklaman aŭ momentan tre limigitan influon, kies kredeble plej gravan ekzemplon mi mem spertis en Rusujo lastan jaron, kiam mi sukcesis akiri la promeson de l' Rusa ĉefministro ke li permesos refondiĝon de l' esperantaj societoj fermitaj post la spiona afero de Postnikov. Kaj Rusujo estas ekstrema loko por tiaj ekzemploj.

En plej multaj ceteraj landoj nenio simila povus okazi. Tamen niaj rusaj samideanoj en sia gazeto kaj eĉ en siaj kunvenoj estas ĝuste el ĉiuj esperantistoj tiuj, kiuj plej kore kaj kutime ligas fratecan ideon kun Esperanto. Cetere se la registaroj vere tiom atentus je ni, kial ni necese kredus, ke nia interna ideo malplaĉus al ili? Neniu tiom laŭdis ĝin kiom iliaj reprezentantoj ĉe niaj kongresoj. Pri nenio alia parolis ĉiuj senesceptaj registaraj salutantoj, ministroj, urbestroj aŭ konsilantoj de la Unua ĝis la Naŭa Kongreso. Kaj se ili ĉiuj mensogis kaj malsincere parolis kaj se vere ĉiuj registaroj nur deziras militon, malamon kaj sangon, tiam ĉu pli bone estas, ke ni silentu kaj kaŝu nian idealon por konservi ilian altan favoron kaj poste fali kun ili, aŭ ke ni kuraĝe staru ĉe la flanko de l' noblaj homoj kiuj nepre venkigos iam en la mondo la justan ideon pri paco?

Ekzistas ĉe kelkaj esperantistoj vere ridinda timemo rilate al la nobleco de nia afero dum ili ofte ne simile hezitas por fari polemikojn kaj krei interesperantistan politikon. Tipa ekzemplo de tio estas la flama parolado de kongresano en Bern en la diskutado ĉe U.E.A. de la jena propono: "Ke estu konsiderata kiel aginta kontraŭ la celo de U.E.A. ĉiu persono kiu per malhonestaj faroj, kiel diskonigado de falsigitaj informoj, skribado de insultaj gazetartikoloj, uzado de malhonestaj rimedoj, por spionadi k.t.p. provas instigi al malamo inter gentoj." Unu kongresano leviĝis por protesti je nomo de patriotoj kontraŭ tia propono "kiu kaŭzus al ni malfavoron de la registaroj kaj devigus U.E.A. eksigi siajn membrojn kiuj fidele defendos sian patrujon kaj faros sian devon en okazo de milito." Mi vere min demandas kio malfavorigus la registarojn se ne ia parolado, kiu malkaŝe kulpigas ilin pri protektado de malhonestaj faroj kaj klasigas la soldatojn inter malhonestaj homoj! Stranga patriotismo! Feliĉe la delegitoj respondis al tiaj vere malprudentaj kaj nepatriotaj asertoj akceptante la principojn de la tre interesa propono de S-ro Rousseau.

La venontan someron ni kunvenos en Parizo. Ĉiuj ni esperas, ke la Deka Kongreso havos du aŭ eĉ tri mil anojn kaj estos grandega sukceso. Ĝoje, entuziasme ni revenos post naŭ jaroj kongresi en la homare glora lando Francujo, kie okazis nia unua neforgesebla kongreso. Ni scias, ke niaj parizaj amikoj ĉion faras kaj faros por prepari grandiozan akcepton al la esperantistoj. Ni scias ankaŭ ke ili havas malfacilaĵojn tre grandajn, kaj esperebIe neniu el ni estos tiel maldanka por ilin pligrandigi per malprudentaj gestoj.

Antaŭ naŭ jaroj la oficiala Francujo, kiu nin salutis kaj per ordena dekoracio honoris nian Majstron, tion faris en la nomo de tiu mondfama franca helpemo al ĉiuj noblaj internaciaj homaraj aferoj, en la nomo de l' centjarlonga tradicio kiu inklinas Francujon al unuiĝo de l' popoloj por libereco, egaleco, frateco. Niaj parizaj amikoj iom timas ke la nuna re-

gistaro ne tiel volonte aprobus similajn mondpacigajn aferojn kaj ankaŭ ĵaluze dezirus redoni al la franca lingvo ĝian estintan rolon de tuteŭropa helplingvo. Ili ankaŭ timas, ke ŝovinistaj gazetoj, tiun ĉi jaron tre influaj, tro facile trovus en iaj propacaj manifestacioj pretekston por fari skandalon kontraŭ nia kongreso. Kvankam estas sendube tre ĉagrenige por ĉiuj ke povas ekzisti tiaj timoj en la fama lando de l' homara progreso tiel universale amata, tamen estas pli bone tion diri por klarigi la timemon de kelkaj niaj francaj amikoj kaj por nin helpi, ke ni neniel ĝenu ilian malfacilan laboron por la kongreso. Ni estas konvinkitaj ke iliaj timoj estas trograndigitaj, ni scias ankaŭ ke nur kelkaj el ili vere timas kaj ni ne dubas, ke ili sukcesos ĉion aranĝi plej lerte;* Tamen estas juste ke ni provas ilin kompreni kiel eble plej profunde kaj simpatie, ĉar ni ĉiuj senescepte volas kunlabori kun ili por doni al tiu Deka Kongreso grandiozan karakteron. Tion dirinte, mi tamen devas atentigi kelkajn, ke ili farus malbonan reklamon al la Deka, kaj tre kruele malhelpus ĝian sindonan organizantaron, se ili plu insistus kontraŭ la ĝenerala sento de l' esperantistaro, kiu nepre kun D-ro Zamenhof amas nian lingvon ĉefe pro ĝia interna ideo, kaj se ili daŭrigus ridindigi aŭ riproĉi tion, kion oni faris en aliaj kongresoj nur ĉar ili timas ke ĝi ne estus farebla sen danĝero en Parizo.

Ni ĉiuj scias, ke la *interna ideo* disvastiĝas per la lingvo mem kaj ke ni tute ne bezonas konstante paroli pri ĝi al la publiko. Multe pli utile estas ĝin realigi per praktikaj servoj kiel faras la sindonaj delegitoj de U.E.A. Ni do esperas, ke en Parizo oni zorgos doni gravan lokon al tiu ĉi flanko de nia movado. Sed ni ankaŭ tre bone scias, ke nur dank' al interna ideo nia lingvo fariĝis vivanta kaj nur sur tiu sento kuŝas la sekreto de tuta nia forteco. Do estas neeble enkatenigi la korojn de l' esperantistoj kiam ili estas inter si kaj estas nekonsilinde ĵeti en iliajn animojn ian senton de ĝeno malpermesante, ke ili libere kunfratiĝu aŭ kore kantu la "Espero"n kun la plena senco de ĝiaj vortoj eĉ pro tio ke ĝi riskus malplaĉi al iu oficialulo aŭ al iu suspektema ĵurnalisto.

Cetere oni ne devas trograndigi la danĝeron de atakoj. Malmultaj okazoj varbis al ni tiel multajn novajn aliĝojn ol certaj publikaj atakoj de Parizaj famuloj en gazetartikoloj. Multe pli danĝera por ni estus indiferenta silentado. Tre bone estas, ke nia tuta oficiala movado, oficialaj gazeto, oficejo, kunsidoj de rajtigitaj delegitoj k.t.p. estu severe neŭtralaj kaj montru nur sekan klopodon por plia lingva unueco en la mondo, laŭ la Bulonja Deklaracio. Sed la esenco de niaj kongresoj, la senton de la esperantistaro, nian historion, tradicion, komunan celon kaj idealon de nia esperantista popolo neniu en la mondo povas malpermesi. Antaŭ kelkaj jaroj tion provis plej eminenta franca esperantisto L. de Beaufront.

*Tiom pli ke neniom eterna estas la registaro de Francujo.

Nun li estas kun tiuj, kiuj abomenas kaj ridaĉas konstante la idealistecon de nia movado, la interfratiĝon, la blindulojn k.t.p. Novan lingvon ili bezonis por reprezenti tian sennoblan spiriton. La nia havas sian propran spiriton. Oni povas ĝin ne ŝati, oni ne povas ĝin nei. Tion bone memoru ĉiuj kiuj deziras ke ni sentu nin "hejme" en ia ajn esperantista kunveno. Nia movado estas neŭtrala rilate al religio, politiko kaj nacieco, sed ĝi nepre *ne* estas neŭtrala rilate al homa progreso ĉar per si mem, de sia fonda inspiro tra tuta ĝia historio ĝis siaj plej praktikaj aplikoj ĝi estas nur idealista klopodo por alporti bonon al la homaro. Nian lingvon ĉiu povas libere uzi por kiu ajn celo, sed niaj kongresoj estas la ĉiujaraj festoj de esperantujo kaj ni ne deziras kaŝi nian lumon sub la lito; ĉar ni kredas, ke nia lumo estas bona, klara, nobla kaj povas nur alporti bonfarantajn radiojn al ĉiu ajn lando, kiu ĝin ricevas. Se niaj unuaj pioniroj ne estus havintaj sentiman kaj ofte eĉ naivan bravecon, nia movado jam ne ekzistus, ĉar sur timemo kaj absoluta neŭtraleco oni konstruas—nenion. Nur venkas en la mondo tiuj, kiuj havas sufiĉe da kuraĝo por riski ĉiujn batojn, kritikojn, mokojn kaj atakojn. Tiaj estis la unuaj esperantistoj. Tiaj ni ankaŭ volas esti. Por Esperanto ni laboras, ĉar ni fidas ke ĝi estas kuraĝa brava milito por la bono. Se ĝi devas fariĝi senforma, senkolora, timema prova proponaĵo, nia movado perdus ĉiun intereson. Nur tre malmultajn el ni interesas la lingvo pro la lingvo mem aŭ pro ĝia Fundamento. Ni ĝin amas pro ĝia senco kaj ni volas ĝin uzi por tiu celo pro kiu ĝi estis kreita. Ni petas liberecon labori laŭ tiu senco kaj veni al niaj ĉiujaraj vastaj familiaj festoj por trovi tie varman kuraĝigon al ĉiam pli vigla laborado por la realigo de nia interna ideo.

En tiu sento mi ĝoje diras:

Vivu la Deka! Ĝis revido en Parizo!

EDMOND PRIVAT.

---

## NELLA
aŭ
## LA VOJO NEKONATA

Originala novelo de Edmond Privat

---

### ĈAPITRO IV

Dum la vagonaro reportis la fianĉon al ŝi, Nella kuŝis en sia dormoĉambro post brulanta febro nun ripozante per longe atendita dormado. Ŝi havis strangan sonĝon, en kiu ŝi vojaĝis kun Paŭlo sur la maro por veturi Grekujon. Bluega estis la ondaro kaj agrablan sonon ritmis la

ŝipo trafendante la maron sub du puntaĵoj de blanka ŝaŭmo. Subite sovaĝaj birdoj alflugis sur la ferdekon kaj atakis ilin. Paŭlo volis defendi ŝin, sed jam unu birdo krevis ŝiajn okulojn. Jen ŝi duonvekiĝis, konscia ke io terura okazis al ŝi kaj ĝoja ke ĝi nur estis en sonĝo. Ŝi tiam ĝuis kelkajn tiujn dolĉegajn momentojn de duondormo, kiam oni sentas sin feliĉe liberigata de l'teruroj de sonĝo kaj tamen ankoraŭ ne retrovis tiujn de reala vivo.

Estis jam vespera krepusko. Iom post iom ŝi revenis al plena konscio, sentis unu okulon sian premata sub bandaĝo kaj ekvidis per la alia la sindonan flegistinon, kiu preparis tason da varmaĵo fumetanta. La tuta vero maldolĉa tiam amase refluis en ŝian memoron. Ŝi demandis sin ĉu Paŭlon atingis sufiĉatempe ŝia telegrama respondo: "Ne maltrankviliĝu—nur eksteraj vundoj—ne interrompu vojaĝon—skribos baldaŭ." Bedaŭrinde nur iom malfrue la flegistino sukcesis trovi knabeton por ĝin portigi al poŝtoficejo.

"Ĉu vi opinias ke mi povos skribi leteron morgaŭ?" Ŝi demandis la flegistinon, kies afabla rideto donis al ŝi la kuraĝon ekparoli.

"Nu, Fraŭlino, ni demandos la kuraciston. Jam de longe li devus esti tie ĉi nun."

"Kiam miaj du amikinoj venis tagmeze, ili diris ke la kondukisto havas nur brakrompon. Mi timis, ke li estis multe pli grave vundita. Ĉu ĝi estas longa por kuraci"?

"Ne, Fraŭlino, ĉar estas simpla rompo. Post kelkaj semajnoj li povos eĉ uzi denove sian brakon."

"Mi estas ankaŭ tiel malpacienca aŭdi novaĵojn pri la malfeliĉa vilaĝano!"

"Doktoro Baŭer promesis vin informi hodiaŭ vespere, Fraŭlino. Jen sonoro ĉe la pordo. Estas li sendube. Ne moviĝu jam. Ĝi vin suferigus tute senutile".

"Nu, Fraŭlino," diris la kuracisto enirante la ĉambron, "kiel vi pasigis la posttagmezon? Ĉu la okulo ankoraŭ tre doloris?"

"Momenton mi dormis, Doktoro, kaj tiam forgesis la doloron. Mi petas vin, kiel fartas nun la kompatinda viro el Tintmere?"

"Trankviliĝu, Fraŭlino. Lin oni transportis al malsanulejo kaj operaciis jam hodiaŭ. Mi telefonis al kolego mia tie kaj li diris ke bonan esperon ili konservas. Eble post tri monatoj vi povos viziti lin pluganta sian kampon en Tintmere."

"Kaj lia familio ĝis tiam?"

"Viaj amikinoj jam decidis zorgi pri tio. Ili jam multe agadis kaj iradis tra la urbo hodiaŭ, kvankam unu havas bandiĝitan manon."

"Mi tiom esperas, ke ŝia mano ne estos difektita."

"Ho, ne, estas nur kelkaj skrapetoj de vitraj rompaĵoj. Tio malaperos rapidege."

"Mi ĝojas por ŝi, ĉar belaj manoj estas kara trezoraĵo por ni, virinoj."

"Nu, vi ĝoju ke tiun trezoron vi mem posedas netuŝita kaj tiel marmore blanka, ke via littuko flaviĝas sub viaj mirinde delikataj fingroj."

"Ne ŝercu, Doktoro. Unu manon mian mi preskaŭ plezure donus por reaĉeti mian vizaĝon nun por ĉiam perditan."

"Kiu vin rajtigas kredi tion, Fraŭlino? Kio do estus mia tasko, se ne fari ĉion por vin kuraci? Vi ne devus vin okupi per tiaj zorgoj. La nuna ĉefa afero estas via dekstra okulo, kiun mi nepre volas savi. Nu, mi ĝin iom rigardu."

Nella silentis dum lin helpis la flegistino por malfari la bandaĝon, lavi la vundojn kaj meti novajn gazon kaj tuketojn.

"Doktoro," ŝi mallaŭte diris, kiam ĉio estis finita, "mi dezirus fari al vi gravan demandon."

La flegistino diskrete forlasis la ĉambron.

"Pri via okulo mi povas ankoraŭ nenion respondi. Mi devos voki kolegon okuliston."

"Ne nur pri tio mi volas demandi, sed entute . . Nu, vi malpermesis ke oni donu al mi spegulon kaj vi evitas tuŝi la temon . . Mi scias, ke mi estas terure difektita. Mi deziras nun ekscii proksimume precize kiel mi aspektos se via plej optimista espero realiĝos? Sincere, sen ia kaŝo, diru al mi, ĉu estas eble, ke mi iam estos denove rigardebla?"

"Kiel koketa fraŭlineto vi estas! Ĉu kuracisto povas tuj antaŭdiri ĉion? Iomete paciencu. Mi fidas, ke ni savos vian okulon, Kio estas haŭtaj bruloj kompare kun la danĝeraj vundoj, kiujn tia akcidento povus esti kaŭzinta al vi?"

Nella malfacile povis ne ekplori.

"Ho, doktoro, ne parolu pri koketeco. Vi do volas nepre min devigi al konfeso de mia plej intima sekreto. Bone, mi . . "

"Ne, tute ne, fraŭlino mi neniel intencis . . Cetere mi tamen iom divenas eble . . "

"Do, se vi devenas, kial vi ne tute malkaŝe, senhezite diras al mi la veron, ĉion, kion vi sentas, por ke mi ne kruele ligu per neplenumebla fianĉa promeso senkulpan junulon, kies vivon mi nek havas rajton, nek volas difekti?"

"Neniu viro estas tute senkulpa. Ho, pardonu min, Fraŭlino. Mi ja tre simpatie komprenas kaj admiras vian noblan senton, sed mi vin certigas; estas tro frue por tion pripensi nun. Plie vi ne devus timi ke cikatroj en la vizaĝo malgrandigos la amon de vere inda viro."

"Cikatroj en la vizago,—Doktoro . . mi donus multe—ho tre multe —por ekscii kiaj estos tiuj cikatroj. Vi diris tion por ne diri plu. Se nur mi estus mortigita de l' akcidento!"

"Ne parolu tiel sensence. Virino havas ne nur la vizaĝon. Vi havas noblan koron, grandan ĉarmon, belajn manojn, belajn harojn, mirindan gracion kaj ĉiajn eblajn talentojn. Vian vivon ne devos tiom influi akcidento tia, sendube malagrabla. Vi povos havi dolĉan kaj utilan vivon, feliĉigi ceterajn ĉirkaŭ vi. Havu kuraĝon kaj ne lacigu tiun kompatindan okulon, kiu devas esti unua zorgo nia nuntempe."

Nella tiam silentis batalante kontraŭ larmoj.

Ankaŭ silentis la Doktoro nun kaj ne devis ion plu diri.

Novan fojon li spertis, ke ne nur medicina lerteco estas necesa al kuracisto, sed ankaŭ plej ofte morala povo kaj certeco. Jam eble tro multon li ĵus diris al tiu junulino, dum por kvietigi ŝian febron pli saĝe estus plu mensogi kaj certigi ke ŝi povos retrovi la perditan belecon. Kaj tamen ĉu honeste kaj fine utile estus luli la korojn per vanaj esperoj? Estis preskaŭ certe, ke malgraŭ ĉiu ajn flego kaj zorgo, eĉ se la okulo estus iom savita, ŝia vizaĝo restos ĉiam kruele malbeligita. Strangajn miraklojn faras naturo kaj tempo, kaj neniu povas ĉion antaŭvidi, sed laŭ lia ĝenerala sperto brulvundoj tiel fortaj ĉiam lasas vivlonge videblajn signojn kaj grandajn kolorajn makulojn. Li mem estas viro. Nu, li facile prezentis al si, kion li sentus, se li devus konstante vivi kun tiel kripligita edzino eĉ adorata karege. Sendube ankoraŭ pli akre morale suferus la edzino mem kaj tia vivo estas nedezirinda, kvankam komprenehle tute ebla kaj eĉ feliĉa por superaj animfortaj personoj.

Kvazaŭ per unu el tiuj ne maloftaj ekzemploj de pensa transflugo, aŭ de virina intuicio Nella tre klare sentkomprenis tion, kion pensis la kuracisto. Ŝi ne bezonis plu demandi lin pli sia sorto.

"Doktoro, ĉu mi povas skribi leteron?"

"Ne hodiaŭ, kredu min. Eble morgaŭ kelkajn vortojn krajone kun okuloj fermitaj. Ĉu vi scias skribi senvide?"

"Mi provos, Doktoro. Kiam vi revenos?"

"Jam morgaŭ kun l' okulisto. Nu, bone dormu kaj havu fidon. Ankoraŭ multan ĝojon donacos al vi la vivo. Bonan vesperon."

Nella streĉis al li palan manon. Post lia foriro ŝi reprofundiĝs en sian premantan pripensadon kaj eĉ ne vidis la flegistinon lumiganta la lampon, kies flavaj radioj peze falis kontraŭ la pordo farante per ombroj strangajn desegnaĵojn.

Dum unu tuta nokto kaj tago jam ŝin mordadis la demando ĉu vivi ĉu morti. Dum longegaj horoj ŝin bruligis febro balancante inter espero kaj malespero.

Por Paŭlo ŝi devis vivi kaj refariĝi bela, kiel li ŝin amas. Se tion kuracistoj ne povas okazigi, ŝi jam decidis, ke tiam ŝi mortos iel ajn. Nu ŝi klare konis sian sorton; neniam oni riparos la difekton kaj eĉ eble ŝian brulantan okulon oni ne sukcesos kuraci. Tamen ŝi ne rajtas sin mortigi. Estus malkuraĝe. Estus nur por eviti ion pli timindan. Pra-

ve la doktoro diris, ke estas tasko por ŝi en la vivo. Se ĉiu, kiun trompus la sorto sin mortigus, kiu estus en la mondo? Ŝi povus havi utilan vivon, sin doni al la ceteraj. Sed ĉu tia penso ne venus nur de malkuraĝo pri morto? Se ŝi vivos kaj liberigos Paŭlon de lia promeso, rifuzos lin revidi, estos kruela spite kaj kontraŭ si mem, ĉu tio ne same difektos lian vivon, kiel se ŝi akceptus lian amon? Ĉar certe li insistos, li ĉion provos, li ŝin amos tamen. Kaj estos la konstanta batalado kontraŭ la potenca ĉiuminuta tento lin revidi, lin aŭskulti kaj . . . ho kiel ŝin flamigis jam tiu tento tiel natura, tiel ripoziga, tiel dolĉa: rifuĝi en liajn brakojn, ĉion forgesi, esti amata, ŝirmata, dorlotata por tuta vivo.

Sed poste ĉu ne estus teruraj elreviĝoj, ruinigaj vekiĝoj? Tamen ŝi havas belan korpon, ŝi tion scias; ŝi havas ĉarmon, ŝi lin amegas, ŝi povus lin feliĉigi . . . Ne; por li, por si, por ke la memoron de ilia amo nenio difektu, ŝi devas esti brava.

Jen ŝajnis al ŝi, ke sur bela valo antaŭ ŝi staras en milkolora pentraĵo ĉiuj iliaj karaj dolĉaj komunaj revoj, tuta ŝia vivo de feliĉo esperita. Ĉion brile lumigis hela gaja suno. Flanke inter montoj staris giganta kluzo post kiu peze murmuregis vasta oceano. Super la elektra malfermilo de l' kluzego tremadis ŝiaj fingretoj. Se ŝi premus la butonon, ĉion englutus la maro. Tamen ŝi volis esti kuraĝa; ŝi devas decidi; neniam plu mi revidos Paŭlon. La elektran butonon ŝi premis kaj jen furiozegis sur la tutan valon la glaŭkaj ondegoj kun muĝanta bruego. Ĉio malaperis sub malvarma, malhela akvamaso kaj ŝin mem la terura fluo forportis en febran ekdormon.

Dume sub flava lumo de la lampo la flegistino silente rekovris tason kaj pladeton de ĵus preparita vespermanĝeto por Nella kaj sin demandis ĉu ankoraŭ varma ĝi restos ĝis la fraŭlino vekiĝos.

*(Daŭrigota)*


**You Ought to take**

# SCIENCA GAZETO

*A monthly magazine entirely in Esperanto, devoted to Science and Industry.*

Contains semi-technical articles on many interesting subjects. Subscribe for your own pleasure—and show each copy to some scientific friend.

*Send Subscription ($1.50) through The American Esperantist Co., Inc. West Newton, Mass.*

(Sample copy, 20 cents)

POLA ESPERANTISTO

Monata gazeto, aperadas okan jaron, ĉiam pliinteresigante sian programon. En 1913-a jaro "P. E.," krom 12 ilustrataj, zorge redaktataj numeroj en klasika, pure fundamenta Esperanto, donos al siaj abonantoj senpagan:

**"LITERATURAN ALDONON"**

(200 paĝa volumo)

**Sendu abonpagon ($1.40) al la American Esperantist Company, West Newton, Mass.**

**Foreign Magazines**

Twelve copies, our selection, back numbers, for only sixty cents

**The American Esperantist Co., Inc.**
**West Newton, Mass.**

# The American Boy



**The SAFE boys' magazine**

Twelve months of healthful brain food **Only $1 a year**

All boy for all boys, not a child's paper. Clean as a whistle, full of pictures, 36 to 52 pages every month. Manly, inspiring stories of travel, adventure, athletics, history, school life, written by most popular boys' authors. Instructive special articles. Fine articles on football and other sports. Departments of Mechanics, Electricity, Photography, Popular Science, How to Make Things, Stamp Collecting, Chickens, Pets, Gardening, Inventions and Natural Wonders.

THE AMERICAN BOY
Regular Price, One Year . . . $1.00
AMERIKA ESPERANTISTO
Regular Price, One Year . . . 1.00
Regular Price for both . . . . $2.00
SPECIAL PRICE FOR BOTH . . . $1.70

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., INC.
West Newton, Mass.

**Read by 500,000 boys**
—and endorsed by their parents

### ĈU VIAJ PIEDOJ ĜENAS VIN?

Portu la "Simpson" "Higena" sanigajn alplandojn en viaj ŝuoj. Sub viaj piedoj restas pura, saniga, subŝtofo. Tuj sendolorigas tiun lacan dolorsenton kaj nepre kuracas kalaĵojn. Varmigas la piedojn dum la vintro kaj malvarmigas dum somero. Pruvo konvinkos vin pri ilia valoro. Sendu la mezursignon de viaj ŝuoj.

Afrankite, 30 cendoj (Sm. 0. 60)

ALBERT E. SIMPSON,
39 Webster St., E. Lynn, Mass.

## IT PAYS TO ADVERTISE IN A. E.

## THE WHOLE OF ESPERANTO

EXCELLENT PROPAGANDA MATERIAL — ORDER TODAY

5c per copy — 10 for 25c — 50 for $1.00

Contains Grammar, Vocabularies and a Little Story. Just the thing to interest your non-Esperantist friends.

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., INC., West Newton, Mass.



"LA UNUA LECIONO"

Vivas hodiaŭ multaj avinoj, kiuj antaŭ sesdek jaroj ricevis sian "unuan lecionon" ĉe

**Emerson Piano**

kaj tiun pianon ili ankoraŭ plej amas.

*Vendistoj en ĉefaj urboj kaj urbetoj.*

*Petu katalogon.*

**EMERSON PIANO CO. - Boston, Mass.**